

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 55, Oktobro 2022



Fotita de Carina Torwald ĉe Björsbo ekster Gotenburgo.

Magazino por kulturo kaj plezuro

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

# Enhavo

Enhavo.....	2	Alia raporto en G-P de 21 septembro, nun kun Tove Mattsson kiel ĵurnalisto .....	15
Pri Ora Ĵurnalo.....	2	Brazila gazeto skribas pri sveda artisto kaj viziulo – Hilma af Klint.....	16
Espeporko meditas.....	3	Ankoraŭ ne mortis Ukrainio.....	17
La kvara simio.....	3	Antuso herbeja – Ängspiälärka.....	17
Alko.....	4	Flyttfåglarne – La migrantaj birdoj.....	18
La mistiko de la aŭtuno .....	5	Ĉevalveturo somere, la 5-an de aŭgusto 2022 .....	18
Vizito al la Libro-Foiro en Gotenburgo.....	7	La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj... ..	19
Mondaj civitanoj bezonas voĉon – Världsmedborgare behöver en röst.....	9	Advokato Michaux kaj doktoro Zamenhof..	21
La Librofoiro en Gotenburgo kaj la angla.....	9	La signifo de la kongreso.....	22
Eŭropa Tago de Lingvoj – 26 Septembro .....	10	La unua letero de Zamenhof.....	23
Esperantaj kongresoj, kiujn mi ĉeestis.....	11	Poŝtkarto de 1912.....	24
Ĉu vi estas esperantista entreprenisto? .....	12	Isaac Asimov – rus-usona verkisto.....	25
Firmao kun esperanta nomo – Nividas .....	12	Pri Vikingoj.....	29
Teksado .....	13	Roberto Poort estas administranto de E-Librejo .....	31
Kuketoj .....	13	Pioniraj virinoj.....	32
Vera kato inter la skulptaĵoj.....	14	Ora Ĵurnalo 5-jaraĝa.....	32
La junuloj liveras gazetojn en Meksiko .....	14		
Pri ĵurnalistiko en Göteborgs-Posten .....	15		

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79,  
siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat,  
073-502 53 32, ingeGERD.granat@gmail.com.  
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström,  
arendsian@hotmail.com.

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato.  
Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo,  
vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj  
temoj.





## Espeporko meditas



- ✂ En oktobro **la organizita ĉasado de alkoj** okazas en Skandinavio, Finnlando, la Baltaj landoj, Rusio kaj Norda Ameriko. Oni devas limigi la kreskadon de la alkaroj, ĉar alkoj kaŭzas grandajn difektojn sur la arbaroj kaj la nombro de la trafikakcidentoj pliiĝas.
- ✂ En oktobro multaj birdoj flugas al pli taŭga klimato. Por birdoj fiksita dato ne ekzistas – sed por homoj en la 19a jarcento estis fiksita tago por translokiĝo: **la 24an de oktobro**. Se servistoj kaj servistinoj volis havi novan dungiston, ili petis de sia labordonanto "labornoton". Sen ĝi ili malfacile ekhavis novan laboron kaj permeson translokiĝi. La 10an de oktobro okazis "Larsmäss", tago por grandaj kermesoj. Tiam labordonantoj kaj laborprenontoj renkontiĝis kaj decidis pri ontaj laborkondiĉoj.
- ✂ Milito ne nur afliktas la atakantan kaj la atakatan landojn. Ĝi afliktas ĉiujn. La aŭtoritatoj diras, ke ni devas esti preparitaj por duraj venontaj tagoj. Leĝoj troviĝas, eĉ militaj leĝoj. **U.N. troviĝas, la**

**Homaj Rajtoj** troviĝas... sed diversaj nacioj enmetas diversajn signifojn en la samajn vortojn. Tamen, ni provas vivi kiel antaŭe. **Ni celebras la U.N.-tagojn kaj en novembro ni celebros la kvinan datrevenon de la naskiĝo de Ora Ĵurnalo.** Dum tiuj kvin jaroj ni – dank' al multaj kunlaborantoj – povis plenigi la retan gazeton per multaj paĝoj de diversaj temoj sub la devizo: **Io por ĉiu!**

- ✂ "**Sciencfikcio baziĝas sur la fakto ke socio ŝanĝiĝas**", diris **Isaac Asimov**, kiu jam en la 1940-a jardeko komencis skribi sciencfikciajn librojn pri estontaj teknikaj eltrovoj, kiuj ebligis kosmovojaĝojn, tempovojaĝojn kaj eble estontan koloniigon de aliaj planedoj. Scienco en kombino kun fantazio povus ŝanĝi nian pensmanieron al pli malfermitaj mondkonceptoj.
- ✂ Mi aprezas kontaktojn kun aliaj gazetoj. En ĉi tiu numero mi citas artikolojn de pluraj.
- ✂ Do: **Vivu la LIBERA VORTO!**  
/Siv

## La kvara simio

finfine estas ĉi tie. Ĝi estas la sumo de la tri antaŭaj.

Li vidas nenium, aŭskultas nenium kaj interparolas kun nenium.





# Alko



*De Ingegerd Granat*

La alko estas la plej granda surtera besto de Svedio kaj Eŭropo. Troviĝas kelkcent mil alkoj en Svedio kaj ili plej bone prosperas en miksita arbaro kun malsekregionoj.

Pinaj branĉetoj, herboj kaj aveno estas aprezata manĝaĵo. La alko ankaŭ manĝas akvajn plantojn kaj estas bona naĝanto. Ĝi estas miopa kaj havas malbonan kolorvidkapablon, sed estas anstataŭe provizita per bona aŭdsenso kaj bonevoluinta flarsenso.

La alko vivas plejparte sola kaj aktivas tage. Frue en la aŭtuno la viralkoj batalas pri la alkinoj kaj povas esti furiozaj bataloj kiam ili kolizias kun siaj kornoj. La alkido pasigas preskaŭ jaron kun sia patrino antaŭ ol ŝi malakceptas ĝin.

Nur la viralko havas kornojn. Ili estas forĵetitaj ĉiujare kaj povas pezi ĝis 30 kg. Estas mito ke nova pinto aldoniĝas ĉiujare sur la kornokrono. Anstataŭe, estas mezaĝaj viralkoj, kiuj havas la plej grandiozajn

kornojn, dum la pli maljunaj viralkoj ricevas malpli bonajn kornojn ĉiujare.

Dum la 18-a jarcento, la alko estis preskaŭ formortinta en Svedio. Kontribuanta faktoro al tio estis ke alkaj feloj estis inkluditaj en la uniformo de la armeo kaj ke la ordinaruloj ricevis la rajton ĉasi alkojn. La alko alie ne havas naturajn malamikojn, sed ursoj kaj lupoj povas mortigi junajn alkidojn.

## Faktoj pri la alko

Disvastigiteco: la tuta Svedio krom Gotlando

Nombro da alkidoj: 1–2 ĉiujare

Gravedeco: 8 monatoj

Alteco ĉe la postkolo: ĝis 220 cm

Pezo: ĝis 800 kg, en Svedio malofte pli ol 500 kg

Vivdaŭro: 16–20 jaroj



# La mistiko de la aŭtuno

*De Ingegerd Granat*

Aŭtuno estas mirinda sezono se vi nur malfermas vian menson kaj kuraĝas vivi kun la multfacetaj koloroj, flava, ruĝa, oranĝa, bruna kaj verda en multaj diversaj nuancoj. Kial ne aliĝi al ni por promeni en la varma brilo de la aŭtuna suno? La temperaturo malaltiĝis kaj ventoblovo povas rapide vundi viajn orelojn. Ŝajnas, ke la tuta naturo provas suĉi la lastan de la somero, ke la batalo kontraŭ la vintro komenciĝis. Se ni decidas iri plu, ni eble renkontos la plej grandan kaj majestan beston en la arbaro en la ĉirkaŭaĵo de Gotenburgo: la alko, la reĝo de la arbaro, kiu eble montras sin en sia alta majesto kaj per sia potenca irado.

Ne senkaŭze en tia renkontiĝo oni povas senti sin iom malgranda.

Renkontoj, kiujn mi mem spertis, estis kiam la hundo kaj mi promenis malsupren de deklivo en aŭtuna tago kaj mi rigardis supren, tiam la alko staris tie en la densejo, tuj antaŭ mi. Li ankaŭ levis la kapon kaj rigardis nin. Ĝi estis grandega alko, kun grandioza krono. Ni, mi kaj la hundo, faris U-turniĝon kaj reiris al la deklivo, rapide!

Alia memoro pri alko pli malantaŭen en la tempo estas suna aŭtuna dimanĉa posttagmezo, kiam mi faris belan biciklan ekskurson al Gråbo. Mi biciklis meze de kolora paletro kaj estis vere mirinda aŭtuna tago. Kiam mi estis preskaŭ hejme, sur rekta vojparto kun larĝaj kampoj ambaŭflanke de la biciklovojo, venis subite, el nenie, grego da tiuj grizaj gigantoj fluante de unu kampo al la alia, tuj trans la biciklovojo. Mia biciklo iris rapide kaj mi tre proksimiĝis al la grego antaŭ ol mi haltigis la biciklon kaj turniĝis. Mi ankoraŭ povas vidi ĉiujn kolosajn nuancojn de grizo en moviĝo. Mia koro batis kaj mi



tordis unu piedon, sed rapide biciklis en la alia direkto sur mia biciklo kun kaprostitirilo sed nur manbremsoj. Tial la biciklo staris sur la antaŭa rado kiam mi panike bremsis. Estis sufiĉa aventuro.

Alkoj estas tute nefidindaj, ili manĝas pomojn en ĝardenoj kaj ebriiĝas kaj troviĝas ĉie, kie oni malplej atendas ilin, kiel antaŭ kelkaj jaroj, kiam surprizitaj komizoj en ŝubutiko en Partille estis vizititaj de alko. La alko eniris la ŝubutikon kaj ĉirkaŭrigardis. Ĝi estis fotita kaj aperis en la revuo rigardante altajn kalkanojn kaj botojn.

Kun aŭ sen alko, aŭtuno estas bela sezono kun sia alta kaj klara aero, kun sia aŭtuna suno kaj ĉiuj koloroj, kiuj ludas la aŭtunan melodion por tiuj, kiuj volas aŭdi. Promenon en la aŭtuna suno mi ne volus malpermesi eĉ al mia plej malbona malamiko (se mi havus tian)! Do, eliru en la sunon kaj ĝuu ĝin dum vi povas, antaŭ ol falos la vintra mallumo.

Kie vi do povas renkonti alkon?

Jes, kial ne en la grandaj arbaroj kaj la sovaĝejo, kiuj troviĝas en Gotenburgo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La plej sekura loko verŝajne estas Slottsskogen, ĉar tie ili libere vagas ene de altaj bariloj.

Nun mi donas kelkajn ekzemplojn de arbaraj kaj subĉielaj areoj, kiujn indas ekkoni kaj kie vi eble povos renkonti la Reĝon de la Arbaro:

### **Bohusleden**

340 kilometroj konsistantaj el 27 etapoj, kiuj ofertas pitoreskan kaj diversan migradon. Ĝi etendiĝas de Lindome en la sudo ĝis Strömstad en la nordo.

### **Lärjeåns dalgång**

Situante en nordorienta Gotenburgo ĝi estas 7,5 km longa naturvojo en valo de rivero. Ĝi etendiĝas de Lärjeholms Herrgård preter Angereds Centrum ĝis Gråbo.

### **Stora Amundön**

La insulo Stora Amundön havas varian pejzaĝon kun marbordaj herbejoj, kverkaj arbaroj kaj grandaj rokaj areoj.



### **Slottsskogen**

La parko Slottsskogen situas en la okcidenta parto de Gotenburgo kaj funkcias kiel subĉiela areo kun bestoj, kiel ekzemple fokoj kaj aparte alkoj.

La infanoj havas sian propran specialan areon kun taŭgaj bestoj en farmmedio. Multaj grandaj eventoj okazas sur la grandaj areoj de la parko apud la birda lageto kun la grandaj longkolaj kaj salm-rozkoloraj fenikopteroj. Slottsskogen estas la granda aventuro en la urbo multmaniere. Tiuj, kiuj havas pli altajn planojn, povas marŝi al la observatorio kaj rigardi en la spacon.



### **Änggårdsbergen**

La monteta areo Änggårdsbergen kun la Botanika Ĝardeno ligas la verdajn parkojn en la okcidentaj partoj de Gotenburgo kun la naturregiono Sisjön sude de Mölndal. Ĉiu, kiu volas, povas serĉi la tomban tumulon el la bronzepoko kaj ŝtonan medion, kie, se la vetero estas bela, oni povas vidi ĝis la mara insuleto Vinga.

### **Delsjöområdet**

La lagoj Granda kaj Eta Delsjön troviĝas ĉi tie. La ekzerccentro de Skatås, kun ĝiaj diversaj kurejoj, kaj la lageto Härlanda estas ankaŭ enirejoj al la Delsjö-areo.

### **Vättlefjäll**

Ĉi tiu areo havas riĉan bestan kaj plantan vivon. Estas ankaŭ sufiĉe multe da lagoj, ĉe kiuj ofte estas aranĝite ripozejoj. Vi ankaŭ povas lui kanuojn kaj pagaji inter la diversaj lagoj. Vi povas vivi riĉan sovaĝan vivon kaj, kiel pruvo de tio, la Samea asocio havas laponan tendon ĉe la lago Trollsjön. Vättlefjäll estas unu el la plej grandaj naturaj areoj proksime de Gotenburgo.





## Svartedalen

Situante sur Hisingen ĝi estas unu el la plej grandaj apudaj pingloarbaraj areoj asociitaj kun subĉiela vivo en ĉiuj formoj.

La migradovojo Bohusleden iras tra Svartedalen.

## Risveden

La suda Risveden estas granda sovaĝejo inter Mjörn kaj Skepplanda.

En la najbareco de granda urbo atendas sovaĝaj spertoj. Eble vi povas renkonti sovaĝajn bestojn ĉie kaj ne laste la grandan alkon. Tial ne estas kialo por deteni sin de eliri en la arbaron. Se vi vidas beston, ĝi estas bonuso, sed vi ĉiam devas montri konsideron kaj ne lasi rubon en la naturo! Paku vian lunĉosakon kaj eliru!

# Vizito al la Libro-Foiro en Gotenburgo



Post la pandemiaj jaroj mi retrovis la Libro-Foiron iomete ŝanĝita. Nun la unuaj budoj, al kiuj mi venis, temis pri manĝo kaj sano. Mi neniam antaŭe vidis tiom da libroj kun bildoj pri legomoj, fruktoj – kaj sanegaj personoj. Eĉ ne estis loko por ĉiuj en la bretaroj. Ili estis en stakoj rekte sur la planko sur paledoj.

La temo de la Foiro estis Sud-Afriko – kaj kompreneble ankaŭ Ukrainio. Mi manĝis sudafrikan veganan manĝadon – bongustan kaj forte spicitan!



Ĉar estis sabato multaj infanoj estis surloke. Ili povis provi fari diversajn aĵojn, ekzemple bindaĵo de memfaritaj kajeroj.

Inter la pli ol 25 membroj de Tidskriftsverkstan (inter kiuj Ora Ĵurnalo troviĝas), mi nur retrovis kelkajn. Sur la unua etaĝo mi trovis **Väst-Sahara** (Okcidenta Saharo), pri kiu Ora Ĵurnalo antaŭe raportis. **Lena Thunberg**, la redaktoro, estis tie kune kun virino de rifuĝkampo en Alĝerio, kien multaj okcidentsaharanoj fuĝis. Ŝi rakontis,



ke la vivo tie sufiĉe bone funkcias kun akvo de profunde boritaj fontoj. Sed varmeĝo ja regis. Pli proksime de la maro en la iama Okcidenta Saharo la ventoj de la maro pli malaltigis la temperaturon. Kiam oni volas studi en universitato, oni iras al Alĝero, neniam al Maroko – la okupanta nacio. Ŝi bedaŭris ke Svedio ne pli forte reagis al la perfortoj fare de Maroko.



Lasse Diding staras ĉe statuo de Lenin.

Ankaŭ alian personon de la septembra numero mi renkontis: Lasse Diding. Li ja kolektas librojn kaj havas privatan bibliotekon en Varberg kun ĉirkaŭ 50 000 libroj. Nun li ofertas stipendion al verkisto kun maldekstraj preferoj. Mi imagas ke persono, kiu gajnos tiun stipendion, povos loĝi en unu el la apartamentoj en lia Jan Myrdal-biblioteko en Varberg. Oni povis aĉeti librojn skribitajn de Jan Myrdal.

Mi volis scii, kiu organizo nun troviĝas sur la iama loko, kie iam deĵoris Esperanto-Societo de Gotenburgo. Mi trovis budon kun la ŝildo: **DEMOKRATIO**. Patro kaj filo kolektis nomojn de personoj, kiuj povus deziri establون de granda grupo en U.N., kiu povus labori por demokratio. Devas esti personoj, kiuj ne nur laboras por siaj landoj, sed por **monda parlamento**. Ĉu ankaŭ esperantista ideo?



*“Ni rekomendas tutmondajn instituciojn, kiuj estas demokratiaj kaj efikaj. Tio inkludas pli fortan kaj reformitan U.N. Ni rigardas parlamentan reprezentadon de la monda loĝantaro kiel neforigeblan parton de demokratio tutmonde. Kiel unua paŝo al monda parlamento, konsultiĝa parlamenta asembleo ene de U.N. estu establita (UNPA). Ni kunordigas la kampanjon de UNPA laborante al tiu celo.”*

Je mia surprizo la patro diris ke la filo komencis lerni Esperanton, sed ĉesis. Kompreneble mi invitis la filon partopreni en mia Zoom-kurso por komencantoj..... kaj espereble li estos kun ni la venontan ĵaŭdon je 17:30. Ni ŝanĝis tagon de merkredo al ĵaŭdo.

Se vi volus legi pli pri la sveda branĉo de **Demokratio sen Limoj** vi trovos informon per:

[www.demokratiutangranser.org](http://www.demokratiutangranser.org) 



*A WORLD PARLIAMENT  
Governance and  
Democracy in the 21st  
Century*

Libro pri globa demokratio de Jo Leinen kaj Andreas Bummel, publikigita en 2018

/Siv



## Mondaj civitanoj bezonas voĉon – Världsmedborgare behöver en röst



### Parlamentara asembleo ene de UN

Unuiĝintaj Nacioj ne sukcesas trakti la defiojn kaj ekzistecajn minacojn, kiujn ni nun alfrontas. Serĉi konsenton inter preskaŭ 200 konkurantaj membroŝtatoj estas recepto por fari tro malmulte, tro malfrue. Tial ni laboras por nova instanco kun civitan-elektitaj reprezentantoj: parlamenta asembleo ene de UN, aŭ la Parlamentara Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (UNPA).

### Monda civitana iniciato en UN

La UN-Ĉarto komenciĝas per "Ni, La Popoloj". Sed oni vane serĉas ilojn por ke ordinaraĵoj homoj influu. Ni proponas, ke mond-civitanoj povu starigi proponojn, kiujn UN alprenas por konsidero. Ni nomas ĉi tiun instrumenton Mond-civitana Iniciato de UN (UNWCI), aŭ mond-civitana iniciato ene de UN.

### Globa reta bazo por voĉdono

Demokratio postulas partoprenon – kaj tutmonda demokratio signifas, ke ĉiuj homoj povas partopreni. Demokratio Sen Limoj laboras por disvolvi interretan platformon, kiu ebligas debaton, voĉdonadon kaj elektojn. Temoj en la tagordo de la platformo povus inkluzivi rezoluciojn en la Sekureca Konsilio aŭ en aliaj tutmondaj korpoj.

### En parlamentara konsilio en FN

Förenta Nationerna lyckas inte hantera de utmaningar och existentiella hot som vi nu står inför. Att söka konsensus mellan nästan 200 konkurrerande medlemsstater är ett recept för att göra alltför lite, alltför sent. Därför verkar vi för ett nytt organ med medborgar-valda företrädare: en parlamentarisk församling inom FN, eller United Nations Parliamentary Assembly (UNPA).

### Ett Världsmedborgar-initiativ inom FN

FN-stadgan inleds med "We, The Peoples". Men man för leta förgäves efter verktyg för vanliga människor att påverka. Vi föreslår att världsmedborgare ska kunna lyfta förslag som tas upp av FN till behandling. Vi kallar detta instrument för ett UN World Citizens' Initiative (UNWCI), eller ett världsmedborgarinitiativ inom FN.

### En globala webbsida för omröstning

Demokrati kräver delaktighet – och global demokrati innebär att alla människor kan delta. Democracy Without Borders arbetar med att ta fram en internetplattform som möjliggör för debatt, omröstning och val. Ämnen på plattformens dagordning skulle kunna inkludera resolutioner i Säkerhetsrådet eller i andra globala organ.

## La Librofiro en Gotenburgo kaj la angla



*Letero de Språkförsvaret (la Lingvodefendo)  
pri anonco de la Librofiro en la gazeto  
Svenska Dagbladet:*

Falis en la okulojn hodiaŭ granda anonco de la Librofiro, publikigita en Svenska

Dagbladet: *"The more sparks the fire has, the brighter it will burn. I invite you to add your spark. Are you ready to change it all?"*

Plej malsupre estas malgranda informo en la sveda. Oni demandas al si, kial la Librofiro,

eble kun helpo de reklamagentejo, publikigas tiun anglan tekston.

Ĉu la plejmulto de la publiko do havas la anglan kiel gepatran lingvon? Aŭ ĉu la vizitantoj konsistas el svedaj stultuloj, kiuj pensas ke la angla havas magiajn ecojn, kiuj logas vizitantojn al la foiro? Aŭ ĉu la Librofoiro kaj la reklamagentejo ne trovis tradukistojn? Aŭ ĉu ili malŝatas traduki tekston el la angla? Aŭ ĉu la angla havas nur ornaman funkcion en la kunteksto?

La demando estas, kiuj vere estas la plej grandaj idiotoj. Estus interese scii, kiajn

raciajn konsiderojn la Librofoiro kaj ĝia reklamagentejo faris.

Vi devus scii respondi tion, ĉu ne?

*Per-Åke Lindblom*

**Nätverket Språkförsvaret**

<http://www.språkförsvaret.se>

<http://www.sprakforsvaret.se>

**E-poŝto:**

sprakforsvaret@yahoo.se

sprakforsvaret@sprakforsvaret.se

## Eŭropa Tago de Lingvoj – 26-a de Septembro

Rubriko en la oktobra numero de la revuo **Turka Stelo**



*„Justan multlingvismon en Eŭropo ni subtenas. Lerni Esperanton en la baza lernejo faciligas la postan lernadon de aliaj eŭropaj lingvoj, kaj kontribuas al la atingado de la celoj de la eŭropa multlingva edukado.*

*La metodo „Multlingva Akcelilo” sur la bazo de Esperanto estis la plej subtenata propono de la eŭropaj civitanoj en la cifereca platformo de la konferenco pri la estonteco de Eŭropo por la temo Edukado.*

*EU aŭskultu siajn civitanojn! – Renato Corsetti*

Ĉi tiun artikoleon mi trovis en Turka Stelo. Ni ja sendas Oran Ĵurnalon al Turkio kaj la redaktoro de Turka Stelo sendas la turkan revuon al ni.

La sama ŝildo, kiu ĉiun jaron akompanas la datrevenon de la Lingva tago, ankaŭ akompanas la artikolon de Turka Stelo. Sed la rubriko estas: **Eŭropa tago de lingvoj** – kaj verŝajne ankaŭ Turkio iel celebras ĝin, kvankam la lando pliparte troviĝas en Azio.

**Ĉu estas pliaj nacioj ekster Eŭropo, kiuj celebras tiun tagon? Tiukaze ni devus nomi la tagon „La internacia lingvotago”.**

Mi ofte aŭdas ke Esperanto havas propedeŭtikan valoron – ke oni pli rapide lernas alian lingvon, kiam oni antaŭe studis Esperanton. Mi konsentas se temas ekz. pri japano aŭ tanzaniano, kiuj volas lerni la anglan aŭ alian okcidentan lingvon, ĉar ili ja ricevas la strukturon de Esperanto, kiu ja ĉefe estas okcidenta.

Sed laŭ mi Esperanto male ne funkcias kiel propedeŭtikan lingvon, se oni volas lerni la japanan. Oni ne havas avantaĝon unue regi Esperanton por pli rapide lerni la japanan. Tamen ja estas vero ke ju pli da lingvoj oni lernas des pli facile estas lerni plian.

Renato Corsetti evidente nur pensas "oriente al okcidente" – ne la malon.

***Ĉu vi opinias ke Esperanto helpas nin lerni lingvon kun tute alia strukturo ol tiu de la okcidenta lingva strukturo kaj vortfarado?***  
/Siv

## Esperantaj kongresoj, kiujn mi ĉeestis

*Inga Johansson rakontas*



**La 28:a Kongreso de Internacia Fervoja Esperanto-Asocio (IFEF)** okazinta en Skellefteå kun 482 partoprenantoj el 19 landoj. 12 – 18 junio 1976. Partoprenis i.a. 27 svedoj, 33 hungaroj kaj 14 italoj.

Mi iris de Herrljunga, kie mi tiam laboris kaj vivis, al Skellefteå por la 28:a IFEF-kongreso. La loĝado estis en junulargastejo kun tre afabla gastigistino. Ŝi rakontis ke ŝi june havis tri knabetojn kaj atendis la kvaran infanon. Kiel mia avino, ŝi do deziris knabinecon sed imagu – ŝi ekhavis trinaskitojn, nur knabetojn. (Cetere mia avino post la tri knaboj havis knabinecon.)

En la junulargastejo loĝis la granda grupo de hungaraj fervojistoj, el kiuj mi tre bone

ekhavis kontakton kun Ferenc, kiu ofte prunteprenis mian biciklon.

Dum la kongresa semajno estis interesa programo, rimarkinda futbalmatĉo inter teamo fervojaj esperantistoj kaj tre konata virina sveda teamo. Finis 2 – 2.

Interesa ekskurso estis busvojaĝo al la polusa cirklo. La vetero ne estis tre klara, la italoj volis vidi la meznoktan sunon. Tamen vera nokto ne estis. Mi memoras iun hungaron, kiu sidis je mia lito kaj demandis: Ĉu estas la 4:a horo fruvespere aŭ frumatene?



*Bildo el Fondaĵo Vanbiervliet*

**49a kongreso de SAT: 24–30 julio 1976 en Gotenburgo**  
320 partoprenantoj el 18 landoj.

*"Esperante pri sukcesa laboro, mi volas deziri al SAT sukceson pri sia kongreso. Mi certigis, ke ĝi kunhelpos al pli intensaj kontaktoj sine de la internacia laborista movado."* – **Olof Palme**

Interesaj prelegoj, ekz. pri Burundio, teatra vespero, folkloro programo kaj popoldanco. Tuttaga kongresa ekskurso al Frederikshavn, Danlando.

Mi apartenis al la laborgrupo, kiu prizorgis la enskribadon kaj loĝigon en diversaj apartamentohoteloj diversloke en Hisingen kaj Bergsjön. La kongresejo estis en la urboparto Vasastan, en la universitato de

komerco. Tial kongresanoj havis senkostajn bus- kaj trambiletojn – nur montri la kongresinsignon. Mi prunte de mia frato havis lian hejmon en Hisingen.

La popoldanco estis en parko Slottsskogen kaj estis *Eggvena Folkdanslag*, kiu montris la gastojn tutmondajn kiel svede popoldanci.

Dank' al mia tutsemajna laboro en la giĉeto, mi ekhavis novan laboron en Gotenburgo en



la aŭtuno. Tiun laboron mi havis dum 13 jaroj poste.

Tuj post la kongreso de UEA en la sveda urbo Gotenburgo okazis la **69-a Internacia kongreso de blindaj esperantistoj** 2–6 aŭgusto 2003. Entute partoprenis 50 esperantistoj el 12 landoj. Tiu kongreso estis en Dalheimers hus, Majorna.

Mi memoras la kulturen programon, kiam du tre spertaj pianistoj 4-mane ludis. Mi bedaŭras tre ke neniu surbendigis tiun muzikon.



**Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj** (mallongige: LIBE) estis fondita en 1951 dum la 19-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (Munkeno, Germanio).



Ĝin antaŭis *Universala Asocio de Blindaj Esperantistoj* (UABE), fondita en 1923 dum la tria IKBE (Nurenbergo, Germanio), kiu en 1931 transformiĝis al UABO (Universala Asocio de Blindulorganizaĵoj). LIBE precipe celas unuigi diverslandajn blindajn kaj viddifektitajn esperantistojn por helpi al ili en studado, perfektigo kaj praktika utiligo de la internacia lingvo.

## Ĉu vi estas esperantista entreprenisto?

*Ĉu vi estas ESPERANTISTA ENTREPRENISTO?*

*Ni volonte volas konatiĝi kun vi kaj via servo aŭ produkto. KONTAKTU NIN. @Internacia Esperanto-Instituto*

La entrepreno, kiun vi havas kaj negocoj, kiujn vi faras, ne bezonas esti rekte ligita kun Esperanto, sed gravas ke la proprietanto estas Esperanto-parolanto. Ni volonte volas ekscii pli pri via produkto aŭ servo kaj priparoli kun vi unu ideon, kiamaniere ni povas helpi unu la alian. Ni scivolos vian opinion. Kontaktu nin, ni petas. – *Anonco trovita en Facebook.*

ESPERANTO

Ĉu vi estas  
**ESPERANTISTA  
ENTREPRENISTO?**  
ni volonte volas  
konatiĝi kun vi kaj  
via servo aŭ  
produkto.  
**KONTAKTU NIN**  
@Internacia Esperanto - Instituto

## Firmao kun esperanta nomo – Nividas



**Inga Johansson** sciigis nin pri gotenbarga entrepreno kun la nomo "Nividas". Kion ili vendas? Okulvitrojn, kompreneble! La firmao troviĝas en Stokholmo, Gotenburgo kaj Malmö.

**Nividas** ... estas sveda marko de okulvitroj fondita en 2014. La nomo "ni vidas" estas prenita de Esperanto, lingvo kiu estis kreita por unuigi kaj pliigi interŝanĝon inter diversaj landoj kaj kulturoj. Inspirite de la mondlingvo kaj la deziro de homoj vidi sin sen limoj, ni desegnas kaj fabrikas okulvitrojn kiuj povas esti diversaj, kiu ajn vi estas kaj kie ajn vi estas.

# Teksado

de **Maria Nazaré Laroca**  
(Brazilo)

Veido, Ĉinio, enmetis la  
poemon en **Penseo**.



Vortoj estas steloj,  
kiujn ni eklumigas  
aŭ estingas ĉiam.  
Ĉu ekzemplo? Ŝpinisto,  
teksisto de songĝoj,  
vivo kaj morto.  
Antikvaj popoloj al diinoj  
atribuis tian oficon:  
al Nornoj, Moroj, Parcoj.  
Sed la destinon ĉiutage

ni teksas en l' infanaĝo  
de l' animo ankoraŭ.  
La Leĝo de Amo  
kuŝas en la konscienco:  
donaco de Dio al ni.  
Necesas nur kuraĝo  
por ke ni lumigu  
la stelon definitivan.

*Juiz de Fora, 28/08/2022*

## Kuketoj .....

El la fejsbuk-paĝo de Sten Johansson

**Ni uzas kuketojn. Akceptu**

ĉiujn kuketojn

nur necesajn kuketojn

**Vi använder kakor. Godkänn**

alla kakor

bara nödvändiga kakor





# Vera kato inter la skulptaĵoj

Turkio – monumento pri afableco. 😊 El Interreto



En Svedio, Post Nord (Norda Poŝto) eldonas poŝtmarkojn kun katoj. Tamen ili ne aspektas tiel afablaj kiel la turkaj katoj.

Mia onklo kolektis poŝtmarkojn dum multaj jaroj, vendis ilin kaj ricevis tiom da mono ke li povis aĉeti etan domon. Sed estis antaŭ multaj, multaj jaroj.

Nun mi ne konas eĉ unu personon, kiu kolektas poŝtmarkojn.

Kion oni nun kolektas? Ĉu kripto-valuton kiel Bitcoin?

/Siv



**La junuloj liveras gazetojn en Meksiko**

El Interreto



# Pri ĵurnalistiko en Göteborgs-Posten



## Pri la vestaĵstilo de ĵurnalistoj

Christian Wedel, "babilaĵisto", historiisto kaj ĵurnalistoj ĉe Göteborgs-Posten, ricevis la sekvan moton kiam li komencis sian ĵurnalan trakon: **Ĵurnalistoj estas homoj, kiuj estas en la ĝusta loko en la ĝusta tempo sed en malĝustaj vestaĵoj.**

En malnovaj tempoj tre gravis la aspekto de ĵurnalistoj. Kiel ilustraĵo de la aserto, li skribas pri evento, okazinta en la 1920a jardeko:

La ĵurnalistoj Herbert Wärnlöf ĉeestis flugkonkuradon. La aviadilo en kiu li estis, kraŝis en la maron ie ekster Danio. Wärnlöf estis ĵetita tra fenestro sur la flugilon (la fenestroj eble estis pli grandaj ol nun?). La piloto malaperis en la akvo. Savŝipo alvenis ĝuste antaŭ ol la aviadilo komencis sinki. Redaktoro Wärnlöf paŝis seka – de la flugilo al la savŝipo. Kiam la savteamo demandis, kion ili povus fari por li, li respondis: – *Jes, ĉu vi povas pruntedoni al mi kombilon?*




Christian Wedel publikigis malnovan redakcian bildon.

Kiam li, 22-jaraĝa en 1993, venis al G-P, oni ofte portis ĵinsojn kaj jakonojn. La korespondantoj portis kostumojn. Iuj ignoris vestokodojn kaj povis veni al funebro en malkonvena korduroja-jako kaj vakeraĵoj – *"Ĵurnalistoj estas homoj, kiuj estas en la ĝusta*

*loko en la ĝusta tempo sed en malĝustaj vestaĵoj"*...

Ĉu iu hodiaŭ zorgas pri kiel ĵurnalistoj vestas sin?

/Siv



Tjuren som sprang över lekplatsen i Slottsskogen i helgen var skadad och stressad och har avlivats. Älgen på bilden är en annan älg.

ARKIVBILD: MIKAEL FRITZON

## Alia raporto en G-P de 21 septembro, nun kun Tove Mattsson kiel ĵurnalistoj


Alko alveturis la ludejonojn *Plika*, en Slottsskogen. Pluraj homoj vokis la policojn kaj ĉasistoj komencis serĉi la alkon per dronejoj kaj "varmofotiloj". La alko estis vundita kaj streĉita kaj devis esti mortigita. La teksto sub la bildo de alko kaptis mian atenton. Tie oni skribis:

– **La alko sur la bildo estas alia alko.**

Mia demando: Ĉu la identeco de la alko en Slottsskogen devas esti protektita? 😊 /Siv

# Brazila gazeto skribas pri sveda artisto kaj viziulo – Hilma af Klint

Inga Johansson trovis tiun ligilon: [https://easp.org.br/lampiro/lampiro\\_174.pdf](https://easp.org.br/lampiro/lampiro_174.pdf)



Mi malofte verkis pri arto inter miaj artikoloj por *La Lampiro*, tial mi decidis ke, laŭ la eblecoj, mi parolu pri kelkaj specialaj virinoj en kampo de arto. Ĉi-foje la omaĝita estos – **Hilma af Klint**.

Ŝia patro estis Victor af Klint, mara armeisto, kaj ŝia patrino estis Mathilda af Klint.

Hilma af Klint naskiĝis en la sveda urbo Stokholmo, en la 26-a de oktobro 1862. El ŝia familio, ŝi elprenis la interesiĝon pri botaniko kaj matematiko – kio multe influis en ŝia artumado.

Apenaŭ 20-jaraĝa, ŝi estis akceptita ĉe la Reĝa Akademio de Arto de Svedio. Tie ŝi ĉefe studis desegnadon, pentradon de fotoj kaj de pejzaĝoj. Post diplomiĝo kun multe da laŭdo, ŝi gajnis stipendion por daŭrigi sian studadon ĉe grava studio en la centro de Stokholmo en konstruaĵo, kiu en la sveda lingvo nomiĝas "Ateljébyggnaden".

Ege interesa estis ŝia laboro kiel scienca desegnisto en Bestkuracista Instituto. Tie ŝi havis oportunojn fari multajn studojn pri evoluo, plantoj kaj vivo. Tiu pli "normala" arto estis grava por ke ŝi finance sin subtenu. Ege bela... sed tio kio iĝos "verkaro de ŝia vivo" estos io aparta.


Ŝia fratino forpasis en 1880. Kaj en tiu epoko, la spirita flanko de ŝia vivo multe disvolviĝis alproksimiĝante al Spiritismo. Simbologio, Abstraktaĵoj, Teozofio, Madame Blavatsky kaj filozofio de Christian Rosenkreutz alvokadis ŝian atenton. Kaj ŝi eĉ konis Rudolf Steiner, la fondinton de Antropozofio, kun kiu ŝi renkontiĝis kelkafoje poste dum sia vivo. Ŝiaj verkoj estas ĉefe spiritecaj kaj ŝia arto estas konsekvenco de tio.

Post iom da praktikado pri abstraktaj pentraĵoj, inter 1908 kaj 1915, ŝi ekis serion de pentradoj por Templo, kun paŭzo dum

iom da tempo por flegi sian patrinon kiu iĝis malsana. Vokita al tiu laboro, ŝi sentis grandan forton, sen duboj pri kion fari kaj sen ŝanĝi ajnan streketon. Ŝi laboris kun rapideco kaj sekureco.

Konscia pri tio, ke la abstrakta laboro kaj ena signifo de ŝiaj verkoj estis tiom antaŭ ŝia epoko, ŝi sentis, ke la mondo ne estas preta por ricevi tion. Tiam, ŝi esprimis sian deziron, ke ĉio estu kaŝe konservata dum 20 jaroj post ŝia forpaso.

Mi estis bonŝanca kapti la okazon en kiu la muzeo Pinacoteca de ŝtato São Paulo, en Brazilo gastigis kelkajn el ŝiaj verkoj dum periodo. Mi admire rigardis ŝian pentraĵojn, kiu estas ja anime impresa. Mi esperas ke mi iom instigis vin koni pri tiu brila artistino kiu estis pioniro en tiu "moderneca abstrakta pentrarto". Ĝis la sekva artistino de tiu ĉi serio! – **Anna Lobo de Carvalho**



Pliaj pentraĵoj de Hilma af Klint videblas ĉe:  
[https://easp.org.br/lampiro/lampiro\\_174.pdf](https://easp.org.br/lampiro/lampiro_174.pdf)

**En numero 176 de *La Lampiro* troviĝas honorado al Ukrainio.**

*Teksto: Paŭlo Ĉubinskij. Tradukis: Viktor Jaskovec kaj Volodimir Pacjurko.*

## Ankoraŭ ne mortis Ukrainio

Ankoraŭ ne mortis Ukrainio  
 Ne jam mortis Ukrainio, nek liber', nek gloro,  
 Kaj ankoraŭ al ni, fratoj, venos sortfavoro.  
 Kvazaŭ ros' sub sun' pereos malamikoj fiaj,  
 Tiam, fratoj, ni ekmastros Patrolandon nian.

*Ref: Niajn korojn ni oferu sur liberaltaron,  
 Pruvu, fratoj, ke ni estas la kozakidaro!*

Ek al sangbatalo, fratoj, de Sjano ĝis Dono,  
 Ke ne estu l' Patrolando je fremduldispono.  
 Nigra maro tiam ridos, ĝojos Dnipro-avo,  
 Kaj ankoraŭ Ukrainio bonan sorton havos.  
 Vervo kaj labor' fervora plibonigos ĉion  
 Kaj eksonos liberlando en Ukrainio.  
 Trans Karpatoj ĝi reeĥos kaj al step' parolas  
 Ukrainia glor' vastiĝos inter la popoloj



## Antuso herbeja – Ängspiplärka

av Renate Säfström

Kortuŝa renkonto por la  
 fotisto kiam la grego haltis  
 dum sia migrado malsupren  
 al suda Eŭropo.

Ett berörande möte för  
 fotografen när flocken  
 mellanlandade på sin flytt  
 ner mot södra Europa.



[www.fotoforlivet.com](http://www.fotoforlivet.com)



## ***Flyttfåglarne – La migrantaj birdoj***

Se fåglarnes skara!  
Till främmande land  
de suckande fara  
från Gauthiods strand.  
Med vädren de blanda  
sitt klagande ljud.  
"Vart skola vi landa?"  
"Vart för oss ditt bud?"  
Så ropar den fjädrade skaran till Gud.

*(vers 1 av 7)*

**Erik Johan Stagnelius**, född 14 oktober 1793 i Gärdslösa på Öland, död 3 april 1823 i Stockholm, var en svensk poet och författare under romantiken.



Vidu la aron de birdoj!  
Al fremda lando  
ili vespirantaj flugas  
de Gauthioda strando.  
Kun la ventoj miksiĝas  
ilia plenda sono.  
"Kien ni alteriĝos?"  
"Kien kondukas nin via ordono?"  
Tiel krias la plumvestita birdaro al Dio.

*(strofo 1 el 7)*

**Erik Johan Stagnelius**, naskiĝis la 14-an de oktobro 1793 en Gärdslösa en Öland, mortis la 3-an de aprilo 1823 en Stokholmo, estis sveda poeto kaj verkisto dum la Romantika periodo.

## **Ĉevalveturo somere, la 5-an de aŭgusto 2022**

*de Carina Schwarz*



Kiel Urba vakero, vi devas elteni malsekiĝi.

Tute spontane, mi subskribis por longa veturo. 2–3-hora veturo kun multaj galopoj kaj la ĉevalo, kiu estis proponita, estis ankaŭ Dela, mia absoluta ŝatata ĉevalo ĉe Josefin en Lindome. Kion mi forgesis en mia fervoro eksplodi tra la arbaroj kaj kampoj, estis kontroli la veteron kaj la vojon.

Mi foriris frue ĉirkaŭ la tagmanĝo kun plenplena lunĉujo kaj akvobotelo. Estis varme kaj sufoke ekstere kaj la ŝvito penetris mian t-ĉemizon kaj kuris kiel riveretoj ene en la T-ĉemizo.

La tramo ne estis tiom plena kaj je mia ĝojo ĝi iros ĝis Korsvägen kie mi povus ŝanĝi al la taŭga tramo al Mölndal kaj Mölndalsbro, kie mia buso kondukus min al la staloj. Ni ne preterpasis Korsvägen. Ĝi malaperis. Ili elfosis la tutan lokon kaj granda ligna barilo leviĝas kiel muro antaŭ Mölndalsvägen.

Per rapida rigardo al la vojaĝplanilo de *Västtrafik*, mi vidas ke mi povas preni trajnon de la Liseberg-stacio. Tie malsupre sur la plej stranga kajo kaj haltejo, kiun mi iam vidis, la atendado estis longa. Mi ne timas, sed mi neniam volus stari tie sola unu nokton por atendi. Nu, rapide rigardu la vojaĝplanilon. La trajno iras al Lindome kaj de tie mi povus preni la buson kvar haltejojn. Perfekte. Tiam restis nur marŝi 1,7 km.

Survoje al la staloj, mi vidis malhelbluan ĉielon kaj pluvemajn nubojn altiĝantajn. La pli frue suna tago transformiĝis. Tio ne malhelpis feliĉajn rajdantojn, kiuj rapide brosis, surmetis botojn kaj selis. La ĉevaloj de Josefin havas belegajn molajn ŝuojn kaj botojn anstataŭ feraj ŝuoj. Do, iru plenrapide antaŭen. Kaj la ĉielo simple fariĝis pli kaj pli malhela.

Daŭris duonhoron, poste la fulmo ekbrilis kaj la tondro bruis. La ĉielo malfermiĝis kaj pluvis torente. Se iam mi volus veturi kiel fulmo, ĝi estis nun. Dela ne ŝatis la muĝadon kaj en la galopo ŝi ŝprucis antaŭen tiel, ke ŝia

malantaŭo glitis en la kurboj. Mi neniam en mia vivo veturis tiel rapide.

Kiam mi pensis, ke ŝi ne povas plirapidiĝi, ŝi enmetis pli altan transmisilon kaj subite du botoj forflugis. La rajdantoj malantaŭe rimarkis tion kaj ni devis reveni por preni ilin kaj remeti ilin. Kia vidaĵo ni ŝajne estis! En pluvego kun vaporantaj ĉevaloj tute tramalsekaj. Preskaŭ kiel en la Sovaĝa okcidento. ... La sep Nevenkeblaj.

Hejme en la stalo mi preskaŭ kolapsis. La kruroj estis tute tremantaj. Bonŝance, mi ricevis eblecon veturi kaj ne devis marŝi 1,7 km en pluvego kaj tondro. Mi prenis la trajnon de Mölndal al Gotenburgo. En la vagono estis tute silente kiam mi enpaŝis, malseka kaj kota de argilo. Ĉe la domo de mia filo estis duŝo, bona manĝo kaj reprenado de tre malseka kato dum la tondro bruis kaj la pluvo malleviĝis. Estis mirinda sento meti miajn krurojn sur la tablon, spekti filmon, manĝi fritojn kaj trinki glason da vino. Efektive vere mirinda kun tondro kaj pluvego.



## La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

Kion pensi pri la nuna stato de la mondo?

Torben Svendsen, Danio, meditas.

Multaj internaciaj konfliktoj kaj katastrofoj jam okazis en nia mondo kaj nun minacas la sekurecon, pacon kaj stabilecon de la tuta mondo.

Certe gravas, valoras koni kaj zorgi pri la signifo de la internacia respektado de la Homaj Rajtoj de la UN.

Tial, jen aldonita la Deklaracio (en Esperanto) kiun ni tradicie festas la 10-an de decembro – ĉie en la mondo.

Amike salutas,  
Torben [torben.svendsen@gmail.com](mailto:torben.svendsen@gmail.com)

”Internacia Esperanto-Tago –

Ĉiujare, la 10-an de decembro, ni festas tutmonde la Tagon de Homaj Rajtoj. La Tago de Homaj Rajtoj markas la datrevenon de la akcepto de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj de la vojmontra Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 1948.”

[ *Mia komento:* Ne gravas ke ankoraŭ ne estas la 10an de decembro. Ni devas multfoje legi kaj relegi la 30 punktojn kaj demandi al ni, kial oni diversloke en la mondo ne respektas la deklaron. /Siv ]

## **Jen la 30 homaj rajtoj, kiujn mencias la Deklaracio de UN:**

### **1. Ni ĉiuj estas liberaj kaj egalvaloraj**

Ni ĉiuj naskiĝis liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ni ĉiuj havas niajn proprajn pensojn kaj ideojn. Ni ĉiuj devas agi unuj kun aliaj laŭ spirito de frateco.

### **2. Ne diskriminaciu**

Ĉi tiuj rajtoj apartenas al ĉiu, malgraŭ niaj diferencoj.

### **3. La rajto vivi**

Ni ĉiuj havas la rajton je vivo kaj la rajton vivi libere kaj sekure.

### **4. Sklaveco forpasis**

Neniu havas rajton nin sklavigi. Ni povas sklavigi neniun.

### **5. Torturado**

Neniu havas rajton nin turmenti aŭ torturi.

### **6. Ni ĉiuj havas la saman rajton utiligi la leĝaron.** Mi estas persono, same kiel vi!

### **7. Ni ĉiuj estas protektataj de la leĝaro**

La leĝaro estas la sama por ĉiuj. La leĝoj devus trakti nin ĉiujn same kontraŭ diskriminacioj.



### **8. Egala traktado de jure egalaj tribunaloj**

Kiam ni estas neegale traktitaj, ni ĉiuj povas konsulti la leĝaron.

### **9. Nejusta mallibereco**

Sen bona kialo, neniu havas rajton sendi nin al malliberejo kaj teni nin tie aŭ ellandigi nin.

### **10. La rajto je proceso**

Se ni estas prijuĝataj, oni faru tion publike. La homoj kiuj juĝas pri ni, ne lasu sin influi de aliaj.

### **11. Senkulpa, krom se kulpo pruvita**

Neniu estu kulpigita pri io, ĝis lia kulpo estas pruvita. Kiam iuj opinias ke ni faris ion maljustan, ni havas rajton evidentigi ke tio ne estas vera.

### **12. La rajto je privateco**

Neniu provu nin misfamigi. Neniu havas la rajton eniri nian domon aŭ malfermi niajn leterojn.

### **13. Libereco moviĝi**

Ni ĉiuj havas rajton iri en nia lando kien ajn ni volas kaj vojaĝi laŭ niaj deziroj.

### **14. La rajto je azilo**

Se ni timas esti malbone traktotaj en nia propra lando, ni ĉiuj havas rajton fuĝi al alia lando por esti sekuraj.

### **15. La rajto je ŝtataneco**

Ni ĉiuj havas rajton aparteni al iu lando.

### **16. Geedziĝo kaj familio**

Ĉiu plenkreskulo havas la rajton edz(in)iĝi kaj fondi familion, se li aŭ ŝi tion deziras. Viroj kaj virinoj havas egalajn rajtojn.

### **17. Aferoj kiuj estas viaj**

Ĉiu havas la rajton posedi aŭ dividi siajn posedaĵojn. Neniu devus forpreni niajn aferojn sen bona kialo.

### **18. Libereco pensi**

Ni ĉiuj havas la rajton kredi kion ni volas kredi, havi religion aŭ ŝanĝi je religio se ni tion deziras.

### **19. Libere diri kion vi volas**

Ni ĉiuj havas la rajton formi niajn proprajn pensojn, pensi kion ni volas, diri kion ni pensas kaj dividi niajn pensojn kun aliaj.

### **20. Renkonti homojn kie ajn**

Ni ĉiuj havas la rajton renkonti niajn geamikojn kaj pace kunlabori por defendi niajn rajtojn. Neniu povas devigi nin aparteni al grupo, se ni tion ne volas.

### **21. La rajto je demokratio**

Ni ĉiuj havas la rajton partopreni en la



registro de nia lando. Oni devus permesi al ĉiu plenkreskulo elekti siajn gvidantojn.

## 22. La rajto je sociala sekureco

Ni ĉiuj havas la rajton je loĝado, medicina zorgo, edukado, zorgo pri infanoj kaj, se maljunaj aŭ malsanaj, sufiĉe da mono por vivi kaj por medicina helpo laŭ la disponeblaj rimedoj.

## 23. La rajto de la dungito

Ĉiu plenkreskulo havas la rajton praktiki metion, kontraŭ justa salajro kaj la rajton membri en sindikato.

## 24. La rajto ludi

Ni ĉiuj havas la rajton ripozi post laboro kaj malstreĉiĝi.

## 25. Lito kaj ion por manĝi

Ni ĉiuj havas la rajton je bona vivo. Patrinoj kaj infanoj, maljunuloj, senlaboruloj aŭ handicapuloj, ĉiuj homoj rajtas je bonaj prizorgoj.

## 26. La rajto pri edukado

Edukado estas rajto. Elementa edukado devus esti senpaga. Ni devus lerni pri

Unuiĝintaj Nacioj kaj pri tio kiel trakti kun aliaj homoj. Niaj gepatroj povas elekti kion ni lernu.

## 27. Kulturo kaj aŭtora rajto

La aŭtora rajto protektas ies artistajn kreaĵojn kaj tion kion li aŭ ŝi verkis. Laŭ ĉi tiu aŭtorrajta leĝo aliaj ne rajtas tion transpreni sen permeso. Ni ĉiuj havas la rajton je nia propra vivstilo. Ni havas la rajton profiti la bonajn aferojn de la vivo kiujn donas kulturo kaj scienco al ni.


## 28. Libera kaj egalrajta mondo

Devas ekzisti certa ordo tiel ke ni ĉiuj disponas niajn rajtojn kaj liberecojn en nia lando kaj ĉie en la mondo.

## 29. Niaj respondecoj

Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu sola estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco. Rilate aliajn homojn ni havas devon kaj ni devus protekti iliajn rajtojn kaj liberecojn.

## 30. Neniu povas de ni forpreni ĉi tiujn rajtojn kaj liberecojn.



## Advokato Michaux kaj doktoro Zamenhof

*Neil Blonstein publikigis la bildkarton pri Michaux kaj Zamenhof en Facebook.*

**1-a Universala Kongreso de Esperanto** oni nomas la renkontiĝon en **1905**, kiu komencis la serion de Universalaj Kongresoj ĝis la nuntempo. Iniciatinto de la kongreso estis la loka advokato kaj estro de la Esperanto-grupo en Bulonjo-ĉe-Mar, **Alfred Michaux**. Li anoncis ĝin unuafoje okaze de internacia renkontiĝo en la antaŭa jaro 1904.

*El Vikipedio*

*Antaŭ multaj jaroj Neil vizitis nin en la Lingvo-  
kafejo en la Esperantoplaco de Gotenburgo.  
Neil staras kiel la duan de dekstre. /Siv*



*El Vikipedio:*

## La signifo de la kongreso

La signifo de la kongreso konsistas en tio, ke Zamenhof instalas la unuan Lingvan Komitaton, la kongreso akceptis la Deklaracion pri Esperanto kaj la Fundamenton kaj oni decidis pri estonta kongreso. Ne estiĝis konsento pri internacia Esperanto-asocio.

**Enciklopedio de Esperanto en 1933 priskribas la kongreson jene (mallongigoj malŝlositaj):**

» [La] I-a UK [okazis] de la 7a ĝis 12-a de aŭgusto 1905, [kaj] ĉeestis 688 Esperantistoj el 20 landoj. – La unua internacia kunveno, kvazaŭ antaŭkongreso okazis [en 1904] en Calais, kie precipe francoj kaj angloj kunvenis.

Estis eksperimento, ĉu diverslingvaj Esperantistoj reciproke sin komprenas. Ĉar la provo bonege sukcesis, oni decidis kunvoki pli grandstilan kunvenon por proksima jaro en Bulonjo-ĉe-Mar.

Dum la preparoj eksplodis la milito inter Japanujo kaj Rusujo kaj estis danĝero kaj eĉ famo, ke Zamenhof ne povos partopreni. Feliĉe la kaŭzo de la famo estis nur ke lia pli juna frato devis militservi.



Jam antaŭ la kongreso en la gazetoj ekestis diskuto pri organizaj demandoj precipe en [la revuo] Lingvo Internacia (1904, p. 271.) en kiu partoprenis krom Zamenhof ankaŭ Capé, Bourlet, Moch.

Ankaŭ la fama Deklaracio [pri la esenco de la Esperantismo], pli bone la projekto de ĝi, jam aperis en Lingvo Internacia en julio 1905.

Jam antaŭ la kongreso en Parizo okazis internaciaj kunvenoj; ili komenciĝis per neatendita vizito al grupvespero en [la universitato] Sorbonne de gesinjoroj Zamenhof; ĉeestis jam kelkaj eksterlandaj kongresanoj.

Proksimajn tagojn okazis disdonado de premioj per Zamenhof por plej talentaj

lernantoj en Parizo, internacia Esperanto-koncerto, solena akcepto de Zamenhof kaj de la kongresanoj en urba palaco.

La ĉefa karaktero de la kongreso estis la persona interamikiĝo de la propagandistoj, festenoj, koncerto kun deklamo de diversnaciuloj. Dum tia koncerto laŭlitere "malantaŭ la kulisoj" Zamenhof kaj siaj amikoj preparis la finfinan redakton de la Deklaracio ĉiesvoĉe akceptita la sekvantan tagon.


Plej gravaj okazintaĵoj: malferma kunsido en la urba teatro, la fama parolado de Zamenhof, unua publika parolado, je kies fino li deklamis la Preĝon sub la Verda Standardo; ludado de "Mensogo pro Amo" de [Eugène] Labiche.

Proksiman tagon (dimanĉe) katolika diservo (meson faris abato Peltier); naciaj preparaj kunvenoj; tagmeze ekskurso al Wimereux; vespere koncertego; ludado de "Kontraŭvola edziĝo" de Molière, la roloj luditaj de anoj el sep diversaj nacioj.

Lunde: laborkunsido, akcepto de Deklaracio, festena kunveno por 300 Esperantistoj, fratiĝo inter katolika kaj protestanta pastroj (Peltier kaj Schneeberger).

Vespere balo en kostumoj, naciaj dancoj. Pluraj kunsidoj pritraktis la allason de Esperanto por telegramoj, la internacian organizon la elekton en Lingvan Komitaton.

Okazis kritiko kaj klarigoj de Zamenhof pri prononcado, en kiu partoprenis multaj



El Kor/r/espondu Esperanto de Inga Johansson kaj Āsa Sahlquist.

Esperantistoj. Privat parolis pri propagando inter junularo kaj Boirac, la prezidinto, klarigis la plej taŭgan procedon por enkonduki Esperanton en la programon de lernejoj.

Sekvis vojaĝo al angla marbordo [apud] Dovero, proksiman tagon solena fermo de la kongreso. Dum la kongreso okazis ankaŭ la inaŭguro de la Esperanta standardo. «

### Teatraĵoj prezentitaj

- *Mensogo pro amo* de Eugène Labiche. Prezentis amatora trupo: f-inoj SAMUEL kaj PANNEVIN, s-roj C. LEPHAY, Paul Boulet, C. Michaux, MARTIN, SAMUEL, francoj.
- Edziĝo kontraŭvola de Molière. Prezentis amatora 10-persona trupo el 8 landoj: s-ino Rosa Junck (ĉeĥ-devena italino), f-ino H. Cederblat (svedino, membro de la Lingva Komitato), s-ino Avilov (rusino el Tbiliso), s-ro Paul Boulet (franco), s-ro Harold Bolingbroke Mudie (anglo), s-ro J. Ansel (franco), s-ro L. Cogen (belgo), s-ro C. F. Küchler (germano), s-ro Albert Saint-Martin (kanadano), s-ro J. Allum (norvego)
- *Hamleto* de William Shakespeare. Deklamis monologon angla komponistino kaj kantistino F. L. Schäfer.
- *Edziĝo per telefono* de Jacques Ferneuze. Prezentis amatora franca trupo: Georges Warnier kaj Georges Grosset. La prezento okazis en Salono Conway en antaŭkongreso en Parizo.

## La unua letero de Zamenhof

Varsovio 2/14 X 87,

Estimata sinjoro!

Respondon je Via demando kaj konsilo Vi trovos en la verko „Respondoj al la societo“, kiu estos eldonita post 4–5 semajnoj. Je ĉiu okazo mi dankas Vin kore por Via bona volo.

Kun estimo  
Esperanto



# Poŝtkarto de 1912



Poŝtkarto kun verda stampinko kun stelo supre kaj teksto ESPERANTO INTERNACIA LINGVO sube.

## CARTE POSTALE

B. Aeraj 10<sup>an</sup> 2<sup>a</sup> 1912<sup>a</sup>

Kara amiko Winberg:

La numeroj montros al vi la nomon, kaj la rolon kiun en mia grupo ĉiu el ili plenumas.

1. Sro. J. Sabaté – Prezidanto
2. Dro. R. Punti – Sekretario
3. Sro. A. Villafranka – Kasisto (sen mono)
4. " I. Aragonés – Bibliotekisto
- (5. " D. Enrich –) Voĉdonantoj
- (6. " I. Martinez)

De ĉiuj ili akceptu fortan manpremon, kaj de via amiko ricevu koregajn salutojn. Andres Villafranka

Sro Karl Winberg

Bengstfors

Svedujo

Suecia

Sur la bildflanko (vidu sube) estas skribita:

*Amiko Winberg: Jen mi sendas fotografajon de la unua komitato el la E. G. «C. C.»*

*Mi ĝin faris, kaj tial jam vi vidas, ke ne estas tiel bona farita, kiel mi volus. B:A 10<sup>an</sup> 2 – 1912*

En la angulo estas skribita:

*Al la mia plej bona kaj ĝentila amiko, Karl W., lia amiko, A. Villaf. B.A 10<sup>an</sup> 2<sup>an</sup> 1912*

Plej malsupre:

UNUA COMITATO EL LA ESPERANTA C. CASALO

Notu ke la viroj estas numeritaj. Do – kiu estas la organizo kaj kie la renkonto okazis?

En Buenos Aires? /Siv



SF estas la plej grava literatura branĉo hodiaŭ. El ĉiuj fikcioj, nur sciencfikcio baziĝas sur la fakto, ke socioj ŝanĝiĝas. La temoj okazas en radikale alia socio. Povas temi pri tempovojaĝado, troloĝateco, kosmovojaĝo ktp. "Estonta historio", tiel mi priskribas miajn verkojn. Ili foje priskribas la evoluon de la socio dum miloj da jaroj, kiel en la "Trilogio de la Fundamento" (Foundation trilogy), kiu verŝajne estas mia plej fama verko. Mi skribis ĝin kiel 20-jaraĝa (1940). Ĝi influis certan spacan sagaon, kiu fariĝis sukceso 30 jarojn poste. "La Fundamento" okazas en tempo kiam la homaro koloniigis novajn planedojn. Ĝi priskribas la malkreskon de la Galaksia Imperio. Mi estis inspirita de "La Malkresko kaj Falo de la Romia Imperio".

La plej fascina rakonto, mi kredas, estas tiu de nia mondo. Surprize eble, ĉar mi estas sciencfikcia verkisto. Sed realo ne konas limojn, dum fantazio baziĝas sur tio, kio vere okazis. Mi mallonge resumu mian propran fonon kaj kiel mi trovis ion nomatan Historio (kun majuskla H).

Mi naskiĝis en Rusio en 1920. Miaj gepatroj elmigris al Usono tri jarojn poste. Kiu scias, kio okazus al ni sub Stalino, se ni restus, aŭ dum la dua mondmilito kaj la nazia okupado de nia patrujo. Mia patro estis el sufiĉe bonhava komercista familio. Sed alveninte en Usono li estis malriĉa. Post tri jaroj li ŝparis por la antaŭpago por malgranda sukeraĵejo. Ĝi certigis nian vivtenon kaj donis al mi la ŝancon legi SF. Miaj gepatroj ne scipovis paroli la anglan, do mi lernis mem. Mi sonigis vortojn sur signoj kaj legis librojn, kiujn mi pruntis el la biblioteko. Mi fariĝis librovermo.

Bizanco kaj la antikvaj grekoj. Mi legis mondan historion de Victor Duruy, franca historiisto. Ekde tiam, kvankam mi fariĝis natursciencisto, mi ĉiam interesiĝis pri historio. Mi finfine konstatis, ke se oni sufiĉe atente studas la homan historion, oni vidas, ke ĉiu ŝanĝo povas esti ligita al teknologia

progreso. Ekzemple la ŝanĝo en homa vivo kiam agrikulturo estis enkondukita aŭ kiam la arto de presado estis inventita aŭ pulvo aŭ la kompasoj.

Malantaŭ ĉiuj grandaj ŝanĝoj kaŝiĝas scienca aŭ teknologia antaŭeniĝo. En la pasinteco, vi povus atendi vivi kiel en la tempo de viaj gepatroj kaj geavoj. Ne tiel post la industria revolucio. La ŝanĝo estas tiel rapida. Kaj kiam la ŝanĝoj venis pli kaj pli ofte, ekestis sciencfikcio. Mi vidas sciencfikcion kiel la branĉo de literaturo, kiu studas la homan reagon al ŝanĝo. Nia reago al scienca progreso estis aŭ pozitiva aŭ negativa. Vi



vidas tion en la SF-historio. Prenu "Frankenstein", konsiderata de iuj kiel la unua sciencfikcia romano. Ĝi estis publikigita en 1818 kaj skribita de adoleskanto, **Mary Shelley.**

Kelkajn jarojn pli frue, la itala anatomo Luigi Galvani rimarkis spasmojn en dissekcitaj rankruoj, kiuj venis en kontakton kun elektro. Imagu, se elektro donus vivon! Tiam oni povus krei vivon en scienca maniero. Sed en "Frankenstein" la monstro venĝas, kio ne estas klarigita en la libro, kaj mortigas ĉiujn, kiujn lia kreinto amis. Kaj fine ankaŭ la esploriston mem. Jen la timo, kiu ĉiam estis la kunulo de la homo: la timo de la danĝeroj de la scienco. Mi nomas tion la Frankenstein-komplekso. Ĉi tiu aroganta penso provi supozi la rolon de Dio restis centra al SF. "Estas aferoj, kiujn plej bone estas ne scii" estis la mantra. Iom post iom malfido al scienco malpliigis.

La industria revolucio daŭris. Nereflekta fido al la estonteco igis nin kredi ke scienco povus krei utopion. Sed tiu vizio mortis kun la unua mondmilito. Tiuj ĉi masakroj montris, ke la



scienco povas fariĝi la malamiko de la homo. Scienco kreis novajn armilojn kaj aviadilojn por transporti ilin. Scienco ankaŭ estis malantaŭ la batalgaso super la tranĉeoj. Do estas kompreneble, ke la malbona geniulo, la freneza sciencisto, fariĝis centra figuro en sciencfikcio post la unua mondmilito. En la 1930-aj jaroj mi mem komencis formanĝi SF. Kiam mi komencis en la butikoj de mia patro, mi ankaŭ ricevis aliron al sciencfikciaj revuoj. Estis la gazetoj en la sukeraĵejo kiuj estis la plej bona parto de la laboro kaj igis min elteni la longajn tagojn kaj ĉion alian, kio estis malfacila. Mi legis ilin ĉiujn kaj remetis ilin en nedifektita stato en la rakojn de la gazetbudo.

Sed mi laciĝis pri ĉiuj frenezaj sciencistoj. Ĉar mi volis esti sciencisto, mi komencis kontraŭpafadon. Mia esplorfono fakte permesis al mi fariĝi unu el tiuj, kiuj transformis la ĝenron kaj kreis la oran epokon de SF. Sed unue mi ricevis eldoniston: John Campbell. Antaŭ 1938, sciencfikciaj verkistoj ne nepre sciis multon pri scienco, ne pli ol tio, kion ili legis en la ĉiutaga gazeto. Kun Campbell, tio ŝanĝiĝis. Li deziris verkistojn, kiuj povis skribi rakontojn kun realisma scienco.

**John Wood Campbell Jr.**, naskita 8 junio 1910 en Newark, New Jersey, mortis 11 julio 1971. De 1937 ĝis sia morto li estis la redaktisto de la sciencfikcia revuo *Astounding Science Fiction*.



Li ofte elektis publikigi tiajn aŭtorojn, kiuj mem estis sciencistoj, kiuj studis natursciencon aŭ kiuj almenaŭ sufiĉe sciis pri ĝi por povi soni konvinke. Tio kondukis al inundo de novaj verkistoj. Robert A. Heinlein kaj A.E. van Vogt estis la verkintoj super ĉiuj aliaj en tio, kion multaj nomas "la ora epoko de SF." Mi devas mencii ankaŭ trian

verkiston, kiu ŝajnas esti metita egale al ili, nome mi mem, **Isaac Asimov**. Mi neniam suferis de falsa modesteco aŭ iu ajn modesteco.

La plej bonaj rakontoj de ĉi tiu epoko priskribis mondon kun komputiloj, kosmovojaĝoj kaj kulturo, kie scienco estis elstara. Fakte, la sciencfikcia mondo de la 1940-aj jaroj tre similis realon en la 1960-aj jaroj. Nun ni vivas en sciencfikcia mondo. Dum la ora epoko, SF subite iĝis pli estiminda konsiderante la atombombon, raketojn, elektronikon, komputilojn.

**Ĉio ĉi, pri kio SF estis konstante skribata, fariĝis realo.**

Dum la progreso legantoj amasiĝis. Ili entuziasme legis Arthur C. Clarke, Ray Bradbury [kies patrino venis el Dalarna – *noto de R.N.*], Theodore Sturgeon, Fredrick Pohl, Robert A. Heinlein, Alfred Bester A.E. van Vogt, Jack Vance, Frank Herbert kaj multaj aliaj. Mi mem fariĝis plentempa verkisto. Ekde tiam mi verkis averaĝe 13 librojn jare. Miaj rakontoj okazas en proksima aŭ malproksima estonteco. Mi ofte skribas pri la koloniigo de novaj planedoj kaj novaj energifontoj, novaj sciencoj, robotoj kaj artefarita inteligenteco. Mi priskribas kiel teknologio ŝanĝas sociojn kaj la konfliktojn kiuj estiĝas kiel rezulto. Mi nur ĉesas skribi kiam mi enlitiĝas. Mi preferas resti hejme, ĉar mi suferas de "klaŭstrofilio", amas mallarĝajn spacojn. Ĉiuj aŭtoroj uzas siajn oficejojn. Al mi mankas nenio ĉar mi havas mian propran referencbibliotekon. **Kaj ĉiujn librojn, kiujn mi legis, mi konservis en mia memoro.**

**Kiom ni kapablas antaŭdiri la estontecon?**

*El Vikipedio:* **Hari Seldon** estas fikcia figuro en la Foundation-serio de Isaac Asimov. En lia kapacito kiel matematikprofesoro en Streeling University sur la planedo Trantor, Seldon evoluigas psikohistorion, algoritman sciencon, kiu permesas al li antaŭdiri la estontecon en probabilismaj esprimoj. Surbaze de lia psikohistorio, li povas

antaŭdiri la finan falon de la Galaksia Imperio kaj evoluigi manieron mallongigi la jarmilojn da kaoso kiu sekvis. La signifo de liaj eltrovaĵoj kuŝas malantaŭ lia moknomo "Korvo" Seldon. Post verkado de kvin libroj en kronologia sinsekvo, Asimov retroaktive aldonis du librojn al la serio.

En "la Fondaĵo" Hari Seldon estas sciencisto, civitano de la Galaksia imperio kaj evoluigas sciencon, kiu antaŭdiras historiajn ŝanĝojn.

Psikohistorio estas miksaĵo de psikologio, sociologio kaj statistiko. Seldon esploras kiajn ŝanĝojn influas sociojn kaj kiam homa interveno povas plej bone influi la kurson de historio. Li registras holografiajn mesaĝojn por esti malkovritaj de estontaj generacioj en kritikaj tempoj. Hari Seldon ne estas malantaŭ ĉi tiuj fortoj. Li nur regas ilin. Li eltrovas kie malgranda puŝo povas havi la plej grandan efikon. Oni povas imagi grandan gregon da ĉevaloj en sovaĝa flugo. Tiam vi eltrovas, kie vi povas igi la ĉevalojn turniĝi en la ĝusta direkto, por ke ili kuru kien vi volas. Estas ĉefe ĉar mi skribis pri robotoj, ke homoj vidas min profeto.

En majo 1939, deknaŭjara, mi verkis la novelon "Robbie".

Ĝi okazas en la proksima estonteco. Knabineto iĝas ligita al roboto kaj ŝiaj gepatroj maltrankviliĝas. Ĝi estas la unua el kelkaj rakontoj pri robotoj. Ĉi tiuj rakontoj sufiĉe konvinke montris estontan teknologion. La robotoj ne estis Frankenstein aŭ metaforoj. Ili estis maŝinoj, kiuj postulis artefaritajn cerbojn, kiuj povis lokiĝi en ujo iom pli granda ol homa kapo.

En 1940, en la novelo "Logiko" pri roboto, kiu, krom plenumado de sia programo, filozofias, mi unuafoje uzis la vorton "positrona cerbo" por priskribi ilin. Mi ne nomis ilin "komputiloj" ĉar komputiloj ankoraŭ ne estis inventitaj. Ĉiukaze mi konstatis, ke se ni disvolvus komputilajn robotojn, necesus scienco por ilin administri. Mi nomis ĝin "robotiko".



En la malfruaj 1950-aj jaroj, la firmao Unimation iĝis la unua, se temas pri produkti industriajn robotojn. La firmao estis fondita de **Joseph F. Engelberger**. Li diris, ke li interesiĝis pri

robotoj en la 1940-aj jaroj post legi robotrakontojn verkitaĵojn de – Isaac Asimov. Mi ne havis verajn intencojn kun la robotrakontoj. Mi nur volis vendi ilin al la revuoj por pagi universitaton. Sed mi komencis evoluon, kiu ŝanĝos la mondon.

En "La Malica Rondo", novelo pri roboto, kiu ne kondukas kiel atendite, mi prezentis unuafoje la tri leĝojn de robotiko:

**Unua Leĝo:** Roboto neniam devas damaĝi homon aŭ per preterlaso permesi al homo esti vundita.

**Dua Leĝo:** Roboto devas obei instrukciojn de homo tiel longe, kiel tiuj ne konfliktas kun la Unua Leĝo.

**Tria Leĝo:** Roboto devas protekti sin, kondiĉe ke ĝi ne malobservas la Unuan aŭ Duan Leĝojn.

Do, ĉi tiuj leĝoj estas sufiĉe ambiguaj, ke mi povas skribi rakonton post rakonto, kie io stranga okazas, kie la robotoj ne kondukas, kie la robotoj povas iĝi tute danĝeraj kiel rezulto de iu stranga apliko de la tri leĝoj. Ĉi tiuj tri leĝoj ankaŭ estis uzitaj en aliaj rakontoj kaj filmoj tuj kiam la nocio artefarita inteligenteco fariĝis aktuala.

Miaj libroj ne estas profetaĵoj sed eblaj estontaj scenaroj. En miaj libroj mi reprezentas ambaŭ flankojn de etikaj aferoj. Ekzemple, ĉu ni cedu nian liberecon al maŝinoj, kiuj povas garanti nian prosperon? Scienca progreso devigas nin rekonsideri kio estas justa kaj bona. Kiu estas preferinda: kontrolo kaj sekureco aŭ libereco kaj danĝero? En "La Neevitebla Konflikto" mi elektis kontrolon kaj sekurecon. Mi priskribis

realon, kie komputiloj administris la mondan ekonomion, por ke konfliktoj estu evititaj eĉ koste de iuj civitanoj. En "Morto de Tempo" mi elektis liberecon kaj danĝeron. En tiu libro, helpe de tempovojaĝado, la homo decidis ŝanĝi la pasintecon por malhelpi militon kaj katastrofojn, sed ne komprenante la gravan sekvon, ke tio havas por la homaro longtempe.

Ni jam kreis maŝinojn pli efikajn kiuj transprenis laborpostenojn. En multaj lokoj, maŝinoj estas pli efikaj ol homoj. Ekipu homon per raketmotoro – ĉu ĝi povas mezuri ĝis kosmoŝipo? La maŝinoj transprenas... La demando estas vere, ĉu ni povas konstrui maŝinon kiu superbrilas homojn en ĉiuj aspektoj.

**Post kiam ni kreos artefaritan aŭ homfaritan cerbon tiel kompleksa kiel la homo, tiam ĝi**

**povos anstataŭigi la homon.**

Ĉu vi povas imagi komputilon kun sentoj? Certe! Estas nenio, kion faras via, mia aŭ alies cerbo, kiu ne dependas de la cerbaj ĉeloj kaj kiel ili estas organizitaj. Se la sama nombro da ĉeloj estas organizita en la sama maniero, ni povas kopii ĉion! La cerbo estas nur atomoj kaj molekuloj, ĉeloj kaj ligoj. Estas nenio en la fizika cerbo preter fizika materio. Ĝi povas esti kopiita negrave kion ĝi suferas. Mi ne estas mistikulo.

En "La Lasta Demando" la komputiloj pli kaj pli perfektigis. Ĉiu komputilo generis pli progresintan posteulon. En la fino, la komputilo fariĝis, tute laŭvorte, Dio. [Vidu "La Kesto" de Peter Nilsson – *noto de R.N.*]

*Daŭrigota.*

## Pri Vikingoj



*Roger Nilsson legas la revuon **Illustrerad Vetenskap** – Illustrita Scienco – kaj disdonas legitajn numerojn al ni en la gotenburga klubo. Bona ideo, ĉu ne? Mi trovis artikolon pri grupo de sciencistoj, kiuj esploras la genetikajn materialojn (la DNA) de 442 viroj, virinoj kaj infanoj el vikingaj tomboj. /Siv*

La vikingoj ne estis unuigita popolo. Nun DNA el centoj da skeletoj donis al ni iujn respondojn pri la demando: El kiuj landoj venis la vikingoj?

*Kelkaj rezultoj:*

1. La norvegaj vikingoj parte venis el la stepoj. Estis frua enmigrado de brutarpaŝtistoj de la rusaj stepoj.
2. La svedoj parte venas el Mezoriento. Ĉiuj tri nordiaj vikingopopoloj havis genetikajn spurojn de pli fruaj eŭropaj ĉasistoj kaj kolektantoj, same kiel farmistoj de Rusio kaj la Proksima Oriento.
3. La danaj vikingoj similis al la britoj. En Svedio kaj Norvegio, la genaro ne ŝanĝiĝis signife dum la transiro de la Ferepoko al la

Vikingepoko, sed en Danio ŝajnas estinti granda enmigrado de la sudo. La samo okazis pli frue en Anglio, tial la danoj similis al la britoj.

La vikingoj mem kompreneble ne sciis ke ili vivis dum la vikinga epoko.

Nuntempaj historiistoj diras, ke la vikinga epoko ĉefe estas konstruo de la posteularo. Mankas skribaj fontoj. La skribo sur la runaj ŝtonoj estis konciza. Pliajn informojn donas skribistoj de la monaĥejoj en Anglio kaj pli postaj historiistoj kaj artistoj. Neniu el ili hezitis dramigi aŭ uzi sian imagon.

90 esploristoj analizis la DNA-ojn de la vikingoj. Necesis ses jaroj por fari la studon de la vikinga DNA.



Interalie ili trovis la jenan:

- Antaŭ ĉio, la norvegoj konservis la genojn de siaj prauloj.
- La genoj ĉefe venis de Finnlando kaj de la Baltaj landoj al Svedio.
- Ankaŭ sudeŭropaj genoj fluis al Danio kaj Svedio.
- La alfluo de genoj dependis de enmigrado, geedziĝo kaj sklaveco. Vikingoj seksperfortis virinoj kaj venigis kelkajn hejmen.
- Troviĝis politikaj aliancoj en fore lokitaj reĝlandoj.
- Ili ankaŭ havis infanojn kun sklavoj. Tiam 20–30 % el la Skandinava loĝantaro estis sklavoj.
- Ne ĉiuj vikingoj estis helharaj. La genvario, kiu donas nigran hararon, estis multe pli oftaj ĉe vikingoj ol ĉe nunaj skandinavo.
- Gotlando fariĝis centro de la Balta Maro-komercio i.a. kun sukceso, mielo, perloj el vitro, kaj feloj de sciuroj.
- Kiam la riĉeco kreskis oni konstruis pli kaj pli longajn ŝipojn kun malgrandaj kiloj por ke la ŝipoj povu atingi la strandon kaj surprizi monaĥejojn, preĝejojn kaj urbojn.
- Neniu urbo estis tro granda por la vikingoj – oni sieĝis kaj prirabis Parizon, Londonon, Sevilon kaj Konstantinopolon.
- Per helpo de skribaj fontoj kaj arkeologiaj trovaĵoj, kiel tomboj, armiloj, brilantoj kaj ĉenoj de sklavoj, la esploristoj scias, ke svedaj vikingoj velis sur riveroj al la Baltaj ŝtatoj, Rusio kaj la Kaspia Maro.
- Danaj vikingoj celis francajn kaj britajn marbordojn.
- Norvegaj vikingoj unue vizitis Irlandon kaj Skotion kaj pli malfrue ankaŭ Islandon kaj Gronlandon.



La pafarko rompiĝis en du partojn. Tiam diris la reĝo Olov: "Kio tiel sonore rompiĝis?" Einar respondis: "Norvegio for de viaj manoj, mia reĝo!"

Snorre Sturlason en *Heimskringla* pri la marbatalo en 999 ĉe Svolder.




- Ŝajnas ke vikingoj plej agis pri eksterlandaj aferoj ol pri komercio kun siaj landanoj loĝantaj ene en la lando, kiuj ofte vivis tre izolitaj.
- Oni datas la vikingan periodon de la jaro 750 ĝis 1066. En 1066 okazis granda batalo ĉe Stamford Bridge. La angla reĝo Harald Godwinson venkis la norvegajn vikingojn, kiuj provis elŝipiĝi en Anglio, sed malsukcesis. Poste la vikingoj ne plu minacis Anglion.

Do, la uzado de la kono pri DNA vere revoluis la esploradojn. Nun per DNA-testoj ni povas scii, kiom da procentoj de vikinga sango troviĝas en niaj korpoj.

Ĉu grava scio??? /Siv

## Roberto Poort estas administranto de E-Librejo



*La 16an de septembro li skribis en Facebook:*

Gerda malaperis estas libere elŝutebla, originale esperantlingva romano verkita en 1983 de la fama svisa Esperantisto Claude Piron. Ĝi enhavas simplajn dialogojn el ĉiutage uzataj vortoj kaj taŭgas por plibonigi la konon de Esperanto. La rakonto temas pri junaj amikoj kaj mistera forkapto de tradukistino.

<https://libro.ee/book.php?id=1605>

*Gerda-kurso en la Reto (pdf-dosiero):*


<http://www.elferno.cn/elibro/gerda.pdf>

### La vundo

La rakontoj de la galega verkistino Begoña Paz (nask. 1965) prezentitaj en ĉi tiu libro ne traktas la belajn flankojn de la vivo, sed esploras ombrojn de la homa ekzistado; soleco, perforto, vundita pasio, malespero, timo, rompita amrilato estas nur kelkaj el la temoj. La tekstoj estas intensaj, rektaj, senornamaj, samkiel la eventoj, kiujn ili priskribas. La sagaca traduko fare de Suso Moinhos, kiu persone interkonatiĝis kun la aŭtorino, konservas ĉi tiun klarecon.

Rigardu reklam-filmeton pri "La vundo":

<https://www.youtube.com/watch?v=JIFaAkvuBlo>



### Soleco

de **Cata Víctor Català** (1908/1967)

"Soleco" estas libere elŝutebla, katalunlingva romano (1908) de Víctor Català, konsiderita kiel ŝia ĉefverko. La temo de la romano estas la tragedia senpovo de la ĉefrolantino starigi profundan amligon al la estaĵoj, kiuj ŝin ĉirkaŭas.

Víctor Català estas vira pseŭdonimo de la verkistino Caterina Albert Paradís (1869–1966) Traduko: Josep Ventura.

Wikipedia: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Soleco> (romano)

Wikipedia: [https://eo.wikipedia.org/wiki/V%C3%ADctor\\_Catal%C3%A0](https://eo.wikipedia.org/wiki/V%C3%ADctor_Catal%C3%A0)

<https://libro.ee/book.php?id=1667>

# Pioniraj virinoj

## 11. Karin Kock (1891–1976)

Karin Kock, en la jaroj 1936–1966 registrita kiel Kock-Lindberg, naskita en 1891 en Stokholmo, estis sveda ekonomikisto kaj socialdemokrata politikisto.

Ŝi estis la unua ina kabinetministro de la landoj kaj la unua ina profesoro en Svedio pri ekonomiko. Kock ankaŭ estis la unua ina nacia ekonomikisto en Svedio, profesoro kaj ankaŭ ĝenerala direktoro de Statistics Norway (SCB). Ŝi ankaŭ estis pioniro en la virina movado.



*Karin Kock kiel ĉefdelegito ĉe UN-kunveno, ĉirkaŭ 1947.*

## 12. Ingrid Schrewelius (1920–2005)

Ingrid Schrewelius, naskita Nyberg en 1920 en Stokholmo, estis la unua ina raportisto ĉe la televida novaĵprogramo Aktuellt ekde 1960. Ŝi estis televida personulo en la al modo orientita *Lilla journalen* (ekde 1963). Ekde 1995 ŝi respondecis pri la televida programo *Modejournalen*. /Siv

## Ora Ĵurnalo

En novembro 2017 komenciĝis la eldonado de Ora Ĵurnalo. Kun la jaroj estis pli da legantoj kaj ankaŭ pli da personoj, kiuj kontribuis per artikoloj. En novembro la 56a numero venos.

*Roran dankon al vi ĉiuj!*

Ni volus publikigi liston por ekscii iomete pri la legantaro. Ĉu ni povus peti de vi – por la novembra numero – ke vi sendu jenajn informojn:

1. vian nomon
2. hejmlokon
3. landon
4. kion vi legas en la revuo

Bv sendi viajn informojn e-poŝte al [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) antaŭ la 1:a de novembro. Mi antaŭdankas vin! /Siv

